



Estrara Komunikado EKO 2018-15 sendita el Budapeŝto, la 10an de junio.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkröĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

Duolingo povas helpi vin altigi la profilon de via Esperanto-klubo

Se iu en via regiono, interesiĝas pri Esperanto, Duolingo povas nun informi lin/ŝin pri la aranĝoj de via klubo. Kiel kunlabori kun Duolingo? Estas sufiĉe simple kaj tute ne teknike: vi devas pleniĝi ĉi tiun formularon (en la angla) :

<https://events.duolingo.com/host>

Post kelkaj tagoj, Duolingo kontaktos vin por intervjui vin ĉar ili volas nur kunlabori kun seriozaj kluboj kiuj vere rekontiĝas regule. Se ili akceptas vian proponon, vi povos krei retpaĝon pri via klubo (ekz por la klubo en Londono, Britio : <https://events.duolingo.com/london-esperanto>) kaj listigi viajn eventojn. Krome, kaj ĉefe, Duolingo informos ĉiun duolinganon el via regiono, kiu finas la kurson, pri la aranĝoj de via klubo. Potenciale vi altigos vian membronombron.

Nova versio de PMEG lanĉita

Ĝus publikiĝis nova versio de PMEG - la Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko.

La nova versio havas la numeron 15.0.2. Ĝi estas plua ŝtupo cele al dua eldono kiel papera libro. La aŭtoro, Bertil Wennergren, faris ankoraŭ multajn korektojn, kompletigojn kaj ĝisdatigojn, sed plu restas multo por fari. PMEG 15.0.2 haveblas ankaŭ en elŝutebla formo kiel HTML kaj kiel PDF. <http://bertilow.com/pmeg/>



Ĉu vi volas la disvastigon de Esperanto en la Meza Oriento kaj Norda Afriko?

Temas pri problema regiono, en kiu estas malpacoj diversspecaj, kaj tie Esperanto kaj justaj internaciaj rilatoj per Esperanto povus helpi pli ol en aliaj mondopartoj.

En la lasta jardeko ni atingis kelkajn rezultojn (vidu la paĝaron www.esperanto.net/ar/ , la serion de niaj Mezoriantaj Kunvenoj, la lernolibron en la araba, ktp.) sed la situacio de la parolantoj de Esperanto en tiu regiono restas tre malforta laŭ la nombro de la parolantoj. Bonvolu legi la paĝon https://uea.org/vikio/Labor-Programo_De_La_Komisiono_MONA

Ni volas daŭrigi nian retan anoncadon en tiu regiono kaj ni volas venigi junajn homojn el tiu regiono al internaciaj Esperanto-aranĝoj. UEA starigis la Fondaĵon MONA kaj nun ni bezonas helpon de unuopaj esperantistoj, kiuj pensas, ke ni semu kaj semu konstante. Sendu vian esencan eĉ se malgrandan kontribuon al la konto "arabio" ĉe UEA. Pagmanieroj en <http://www.uea.org/alighoj/pagmanieroj> . Indiku "por arabio".

Renato Corsetti

La produktiva Brazilia Kolekto

Regule multaj el ni ricevas mesaĝojn pri tiu brazilia braz-ilo de muzika kreivo. Jen pecoj el lastatempa komunikado.

"Jen tria versio de kanto de Stevie Wonder: [Nur pro am' mi vin alvokas](#), tradukita de [Antonio Luís Lourenço dos Santos](#). Temas pri kanto originale verkita en la angla lingvo, poste tradukita al la portugala de [Gilberto Gil](#), kaj esperantigita el la portugala versio. Tial, el la retejo BRAZILIA KOLEKTO ĝi estas en la kategorio [Versio de versio](#).

Konatiĝu kun la bunto: <http://brazilakolekto.blogspot.com>

Flávio Fonseca koncertis en la 53^a Brazilia Kongreso de Esperanto, en Kuritibo, kaj kantis ĉefe repertuaron el la retejo Brazilia Kolekto!

Kontaktaj: Flávio Fonseca; flafon@gmail.com;

brazilakolekto.blogspot.com;
facebook.com/BraziliaKolekto;

Instagram k Twitter: @BraziliaKolekto;
facebook.com/flaviofonsecamusico;
facebook.com/ocflafon;
facebook.com/osomdapoesia;
facebook.com/cdvosoficial;
facebook.com/grupotakto;
facebook.com/partiturasff



Aranĝoj por la okazigo de la Espeantologia Konferenco 2018 estas survoje, pretas la retejo por diskonigi la strukturon, organizadon kaj enhavon de la konferenco: <http://ek2018.kulturo.net>. Adreso de la konferenco: ek@kulturo.net

Urba placo omaĝas pionirajn esperantistojn

Fine de majo en Massa, Italio, la urbestro titolis urbocentran placon 'Mario e Catina Dazzini esperantisti'. La placo estas proksima al la aktuala sidejo de la Nacia Biblioteko de Esperanto, kiu estis unu el la multaj iniciatoj de la du mondkonataj samideanoj, kaj kiu estis unu el la plej pezaj kaŭzoj de la honoro al ili nun atribuita. Kune kun ĉiuj esperantistoj kaj nome de ĉiuj ni kiuj havis okazon ilin koni, mi sincere dankas la samideanojn de la urbo Massa, pro ilia granda laboro por tion atingi.

Bruĉjo Kasini

PS: Mario Dazzini estis plurjara prezidanto de ILEI. La nuna prezidanto klopodas esplori, ĉu la fratino Catina iam plenumis tiun sama postenon.


Uzbekio reviviĝas kaj progresas

Estas finita komenca kurso por la membroj de nia E-Asocio kiun mi mem gvidis. Ĉiuj membroj (entute 12 personoj) post 12 lecionoj jam interbabilas Esperante. Tion ni sukcesis dum 6 semajnoj.

Niaj dokumentoj estis senditaj al nia Ŝtata Ministerio de Justeco por la registriĝo. Post unu monato ili resendis al ni la dokumentojn por korekti kelkajn punktojn. La Asocio jam faris tion kion oni postulis kaj ni denove fordonis la dokumentojn kaj ni nun senpacience atendas pozitivan respondon.

Jam pretas E-lernolibro por la uzbekaj lernantoj kaj Esperanto-uzbeka kaj mala vortareto kun ĉ. 3000 vortoj. Post la registriĝo ni planas en la oktobro okazigi Internacian E-forumon pri la komerco kaj turismo kaj ĉiujaran, tradician E-festivalon kaj ceterajn Internaciajn aranĝojn. Por efektiviĝi tion, ni nepre bezonas viajn konsilon, atenton, helpon.

Gafur Mirzo, prezidanto de UzEA.



Vortoj: 755

=====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikadoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento nun tute ĝisdata ĝis 2018-14. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.